49a Jaro — N-ro 2a — Februaro 1957a

# BELGA ESPERANTISTO

Fondita en 1908a

Redaktoro-Administranto:
la Prezidanto de R.B.L.E.:
Maur. JAUMOTTE
Avenuo De Bruyn, 44
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de
REĜA BELGA LIGO ESPERANTISTA
Asocio sen profita celo,
aliĝinta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Abonprezo:
Fr. 100,-

**Sukcesplena Semajnfino**

## La Jubileaj Festoj de „LA VERDA STELO"

### Solena Honorigo de S-ro Maur. Jaumotte, Prezidanto de 30 Jaroj.

La semajn-fino organizita, okaze de la Ora Jubileo de la Antverpena Grupo „La Verda Stelo" kaj de ties prezidanto, S-ro Maurice Jaumotte, iĝis vere grandioza sukceso, ne nur laŭ la nombro de la aliĝintoj, ne nur laŭ tiu de la ekster-antverpenaj partoprenantoj, sed ankaŭ laŭ tiu de la realigo de la diversaj aranĝoj, kiuj vere, ĉiuj senescepte, plaĉis al ĉiuj ĉeestantoj ĝenerale kaj al ĉiuj ankaŭ individue.

Antaŭ la komenciĝo de la festoj, delegacio gvidata de la Prezidanto, S-ro Jaumotte kaj de la du vicprezidantoj S-roj M. De Ketelaere kaj H. Sielens, samtempe prezidanto de la Organiza Komitato, iris al la Schoonsel-enterigejo, kie floroj estis demetataj sur la tombojn, unue, de la fondinto kaj S-ino Schoofs, kaj poste, de F-ino Henriette Toussaint, la bedaŭrata festestrino de la Grupo, kiu mortis antaŭ du jaroj.

Ekde la 16a horo, malfermiĝis la akceptejo en „Witte Leeuw", kie la Grupo kunvenas de pli ol 35 jaroj, kaj baldaŭ alvenis jam eksterurbanoj kaj, iom poste, ankaŭ la unuaj Verdstelanoj.



La „Moŝto"

**LA SABATA ENKONDUKO**

**Bonvenigo kaj Malfermo de Ekspozicio**

Kaj kiam je la 18,30 horo, S-ro H. Sielens, nome de la organiza Komitato, bonvenigis la ĉeestantojn, jam tre multnombrajn je tiu momento, li samtempe deziris al ili plej agrablajn tagojn en la mezo de la jubileanta Grupo. Kaj ĉe l' malfermo de la festoj li transdonis kelkajn belajn florojn al S-ino Jaumotte.

S-ro Jaumotte tiam invitis ĉiujn supreniri al la dua etaĝo, kie li inaŭguris la Ekspozicion „Henriette Toussaint."

La celo de tiu ĉi Ekspozicio ne estas montri ampleksan propagandan inventaron, sed novan ekspozician materialon, kiun la Grupo akiris per la rimedoj de postlasaĵo Henriette Toussaint.

Tiu ĉi materialo konsistas el modern-stila tubar-sistemo, facile kunmetebla kaj elprenebla kaj kiu portas grandajn panelojn, diversmaniere lokigeblajn kaj kiuj permesas la alfikson kaj do montradon de la plej diversaj dokumentoj kaj propagandiloj.

La materialo estas realigita de S-ro J. Montmirail, kiu kunmetis la tuton kun la helpo de S-ino Léa Bernaerts, F-ino H. Hofkens kaj S-ro J. Verstraeten, kiuj kunmetis aŭ desegnis la diversajn panelojn.

*



**Post la oficiala akcepto, la ĉeestintoj estas kune fotografataj antaŭ la Urbdomo.**

*(Kliŝo „Gazet van Antwerpen")*




**S-ro Morris de Ketelaere transdonas la donacon de „La Verda Stelo" kaj de la aliĝintoj al la festoj al S-ro Jaumotte; meze: S-ro H. Sielens, prezidanto de la O.K.** *(Kliŝo: „De Nieuwe Gazet")*

Tiu ĉi ekspozicia materialo estas uzebla en multaj kaj diversaj cirkonstancoj. Kaj estas ja la intenco de „La Verda Stelo" ĝin meti je la dispono de kiu ajn esperanta organizaĵo, kiu ĝin bezonos propagandcele.

Ĉe tiu ĉi inaŭguro, dum kiu S-ro Jaumotte honorigis la memoron de F-ino Henriette Toussaint, li transdonis al ties fratino S-ino Bernaerts, la Medalon „Pro Merito" post la morto, kun peto ĝin havigi al ilia kara patrino, kun la plej koraj komplimentoj de la estraro.

Li ankaŭ transdonis florojn al la du kunhelpantinoj S-ino L. Bernaerts kaj H. Hofkens.

Krom dek paneloj propagandcelaj estas ankaŭ kunigataj ses paneloj, kiuj rekte rilatas al la vivo de la jubileanta grupo kaj kiuj surhavas gravan kolekton de grupaj fotografaĵoj: unu panelo memore al la fondinto Frans Schoofs; unu al la jubileanta prezidanto S-ro M. Jaumotte; unu al la du universalaj kongresoj, kiuj okazis en Antverpeno en 1911 kaj 1928; du al la grupa vivo inter la du militoj kaj unu al la grupa vivo en la lastaj jaroj.

La Prezidanto fine fortiris la vualon, kiu kovras panelon kun „La Espero" kaj ĉiu tiam havis la okazon detale rigardi la diversajn montrataĵojn, inter kiuj ankaŭ busto de la jubileanto, de la skulptisto Frans Everaerts.

### Kabareta Vespero

Kaj tuj poste, la salono sur la unua etaĝo pleniĝis. En la angulo estis konstruita scenejo, arte ornamita, kun vera teatra kadro, kiun bonege prizorgis S-ro Fr. Schellekens kaj lumigebla per perfekta teknika sistemo, kiun aranĝis S-ro Van Dessel. Kaj la tuto tuj vekis ĉies admiron.

Kiel antaŭnumero al la programo, S-ino van den Neste, deklamis neantaŭviditan, malgrandan memverkitan poemon je la honoro de la festota Maurice Jaumotte.

Tiam kantis S-ro Karel Ameryckx, piane akompanata de F-ino Cl. Peeters, kaj per ampleksa repertuaro li agrable surprizis la ĉeestantaron.

Sekvis deklamnumero de S-ro Hector Vermuyten, kiu, unufoje pli, prezentis unu el siaj verketoj, sentoplenan poeziaĵon; kaj pianludado de F-ino Evelyne van den Neste, kiu akiris merititan sukceson per „Jours de Noce" de Grieg kaj „Valse" de Chopin.

Kaj la konkludo de la kabareta parto estis unuakta teatraĵo: „Murdo okazis" en kiu F-ino Mimi Ameryckx kaj S-roj Jozef Vinck, Walter Van Nereaux, Adhémar Verhoeven, Fr. Schellekens kaj Karel Ameryckx vekis, ĝis la fino, vere misteran atmosferon ĉirkaŭ murdo...kiu ne okazis!

La sondekoro de S-ro Montmirail helpis al la pliviglígo de la tuto kaj la sukceso estis ĝenerala.

S-ro Jaumotte, kiu prezentis la diversajn numerojn, per floroj dankis la ulinojn kaj, per laŭdaj vortoj, ĉiujn gekunhelpintojn al la programo, inkl. la suflorinon F-inon Jeanne Ameryckx.

Kaj tiam sekvis, — dum la festestrino F-ino L. De Winter donacis al ĉiuj dolĉaĵojn, — plej vivoplena danca parto kun vigliga orkestro kaj kiu daŭris ĝis noktomezo; je kiu momento la Prezidanto deziris „Bonan Nokton" al ĉiuj, por ke ĉiuj estu akurate pretaj por la morgaŭa tago.

## Dankvorto

*La Jubileinto kaj S-ino Jaumotte ne kapablas skribe respondi al ĉiuj kiuj, aliĝante al la festoj, per laŭdaj vortoj, per donacoj, per leteroj aŭ telegramoj honorigis ilin aŭ havigis al ili gratulojn el ĉiuj urboj de Belgujo kaj ankaŭ el la eksterlando, kaj tial uzas tiun ĉi formon por almenaŭ publike danki ĉiujn plej kore pro la belegaj festoj, organizitaj okaze de la 50jara jubileo de nia Grupo „La Verda Stelo", sed kiuj estis, grandparte uzataj por festi ilin.*

*Ili neniam forgesos la multnombrajn elmontrojn de simpatio, kiujn ili tiuokaze ricevis!*

### LA DIMANĈA TAGO
### Solena Jubilea Kunsido

Proksimume 125 aliĝintoj al la jubileaj festoj, kuniĝis dimanĉmatene, je la 10a en la Festsalono de la „Internacia Marista Domo", kie ili estis, ĉe l' eniro, bonvenigataj de la Direktoro S-ro H. Sielens kaj de la prezidanto de la Grupo.

Je kvarono post la 10a, S-ro H. Sielens malfermis la kunsidon per kelkaj pliaj bonvenigaj vortoj.

Sur la scenejo li estis ĉirkaŭata de S-roj M. Jaumotte, prezidanto; Morris De Ketelaere, vicprezidanto; Jules Verstraeten, sekretario, kaj René Balleux, kasisto; de S-ino Julia Plyson kaj S-ro J. Soyeur, gevicprezidantoj de Reĝa Belga Ligo Esperantista, kaj de S-ro Georges Van den Bossche, direktoro de „Belga Esperanto-Instituto".

Li tuj transdonis la parolvicon al S-ro Jaumotte, por la solena memorigo de la kvindekjara ekzisto de la Grupo.

S-ro Jaumotte, kun emocio, parolis pri la fondinto Frans Schoofs kaj pri ties edzino, kiu tre certe esperis partopreni tiun ĉi feston kaj kiu poreterne forlasis nin, nur antaŭ kelkaj monatoj.

Li, paŝo post paŝo, pritraktis la diversajn plej gravajn okazintaĵojn en la 50-jara ekzisto de la Grupo, dufoje interrompita per longaj militoj. Li memorigis multajn helpintojn en la gvidado, kiuj malaperis; kaj fine havis la plezuron voki sur la podiumon la nun ankoraŭ ĉiam fidelajn kaj kunlaborantajn elementojn, kiuj permesas ke „La Verda Stelo", — post kvindek jaroj, — ne nur ankoraŭ ekzistas sed ĝuas vivoplenan kaj viglan vivon.



### Honorigo de Veteranoj kaj Jubileantoj

La unuaj vokitaj estis la veteranoj G-roj Jan Jacobs kaj S-ro W. Dollez, kiuj ne daŭre apartenis al „La Verda Stelo", sed kiuj, jam antaŭ la unua mondmilito, ludis rolon en „La Suda Lumo", frata antverpena grupo, nun malaperinta; S-ro G. Vermandere, esperantisto de la sama epoko kaj kiu venis de Gento al Antverpeno, post la unua mondmilito. Kaj krome S-ino Lucette Faes-Janssens kaj S-ro Morris De Ketelaere, kiuj ambaŭ esperantistiĝis en tiu jaro 1917, en kiu ankaŭ la parolanto mem estis varbata de S-ro Schoofs.

S-ro Jaumotte transdonis al la veteranoj artplenan, arĝentan plateton kun laŭda enskribo kaj li mem ricevis la sian el la manoj de S-ro Sielens. Ĉiuj tiuj ĉi veteranoj estis laŭvice longe aplaŭdataj de ĉiuj ĉeestantoj.

Sekvis tiam la transdono de Medaloj „Pro Merito" al tri malnovaj samideanoj, kiuj, jam antaŭ la milito, vigle kunlaboris en la kunmeto kaj efektivigo de la ĉiusemajnaj programoj: F-inoj Hél. kaj Math. Hofkens kaj S-ro K. Ameryckx kaj al ĉiuj postmilitaj kunlaborantoj, kiuj eniris la Komitaton en 1950, ĉe la vera revigligo de la Grupo, nome S-ro J. Verstraeten, sekretario; S-ro René Balleux, kasisto; S-ino L. Bernaerts kaj F-ino L. De Winter, prizorgantinoj de la festoj; S-ro J. Montmirail, prizorganto de la aparataro; R. Jaumotte, gazetara sekretario kaj komisiito por la junularo kaj, fine, ankaŭ al S-ro P. Peelman, senlaca gvidanto en la kabareta sekcio kaj S-ino Henny Jacques-De Ketelaere, profesorino, kiu antaŭ kelkaj jaroj reprenis tiun taskon de la prezidanto. Ankaŭ tiuj ĉi meritplenaj kunlaborantoj akiris aplaŭdan sukceson.

Kaj fine S-ro Jaumotte vokis la „fidelulojn", kiuj akiris medalon pro 25 aŭ 30-jara membreco: inter ili estas en la nuna jaro 1957: S-inoj Livine Merckx kaj A. Bolsius kaj D-ro Christiaens, kiuj akiras steleton sur la arĝenta medalo, pro 30-jara membreco, kaj S-ro Henri De Hondt, membro denaskiĝa, kiu ricevis la arĝentan medalon pro 25-jara membreco.

Kaj sekvis tiam tuta aro da „fideluloj", kiuj ne jam estas membroj de 10 jaroj, sed al kiuj la estraro, — *escepte kaj okaze de la ora jubileo* —, jam nun transdonas la bronzan medalon, nome al ĉiuj, kiuj membriĝis en la vera momento de la revigligo de la grupo kaj kiuj do aniĝis en 1950 kaj 1951.

Tiuj ĉi estas: en 1950: G-roj Balleux, S-ino L. Bernaerts, G-roj Debacker, F-ino L. De Winter, S-ino A. Govaerts, F-inoj H. Heyens kaj G. Leibovitche, S-roj Guy Schoofs kaj Eug. Seghers, S-inoj E. Thibau kaj R. van de Cauter, S-roj A. Vercruyssen, A. Verhoeven kaj J. Verstraeten; kaj en 1951: F-inoj S. Bal kaj H. Brack, S-inoj R. De Soete kaj M. Landerwijn, S-ro J. Montmirail, S-ino M. Peelman, F-ino Fern. Schoofs, S-ino L. Timmermans, F-inoj Chr. kaj M. Van den Bossche, S-roj J. kaj W. Van Nereaux kaj Wim Verdijck, S-ino C. Verhoeven, S-roj F. kaj G. Verhoeven, G-roj J. Verstraeten kaj S-ro J. Vinck.

Ankaŭ la transdono de tiu granda serio da medaloj estis okazo por daŭ-

## Daŭrigas la Jubileoj!

**Ankaŭ la Brusela Grupo ekzistas de 50 Jaroj**

Dum la Festeno de „La Verda Stelo" la prezidanto iom ŝerce diris al la Prezidanto de la Brusela Grupo: „Mi enskribigas min por viaj jubileaj festoj...Kiam ili okazos".

Kaj S-ro Jacobs, vere ne povis respondi kaj, de tablo al tablo, iris la demando al pli malnovaj samideanoj por ekscii la ekzaktan daton de la fondiĝo de la Brusela Grupo, pri kiu oni tamen povas supozi ke ĝi ankaŭ ekzistas proksimume same longtempe, kiel la nun festanta Grupo.

Puŝata per jurnalista kuriozeco, la Prezidanto de nia Ligo, la postan tagon, esploris malnovajn kolektojn de „Belga Sonorilo" kaj de „Belga Esperantisto" kaj baldaŭ evidentiĝis ke la Brusela Grupo estas starigita *la 10an de februaro 1907*, do nun, ekzakte antaŭ 50 jaroj.

S-ro Jaumotte tuj surpaperigis ĉiujn detalojn, kiujn li ektrovis pri la unuaj paŝoj de la Grupo kaj pri ĝia plia evoluo, kaj havigis ĉion al S-ro R. Jacobs, kiu legis tiujn informojn dum la ĝenerala jarkunsido, kiu tuj komisiis la Komitaton organizi festojn okaze de tiu ora jubileo.

Kaj la 2an de februaro, dum la Administrantara Kunsido de R.B.L.E., S-ro R. Jacobs povis jam anonci ke la Festoj de la Ora Jubileo de la Esperantista Brusela Grupo okazos *dimanĉon, la 7an de aprilo.*

Detalojn pri tiuj ĉi festoj ni presigos en la sekvonta numero, sed ni tamen povas jam diri ke, ĝeneralaspekte, la programo estos iom simila al la dimanĉa tago en Antverpeno: solena kunsido; verŝajne akcepto en la Urbdomo; festeno kaj kabareta prezentado.

Jam de nun, ni alvokas ĉiujn grupgvidantojn por ke ili instigu siajn membrojn iri ankaŭ al Bruselo okaze de tiu ĉi jubileo.

La Grupo de Bruselo ne estas tiom grava laŭnombre, kiel tiu de Antverpeno kaj do bezonas ankoraŭ pli da apogo de ekster la urbo, por doni al la festoj la solenan karakteron, kiun ili bezonas kaj meritas!




**F-ino S. Obozinski transdonas la donacon de la Brusela Grupo. Maldekstre: S-ino J. Plyson kaj S-ro J. Verstraeten; dekstre: S-ro Van den Bossche** *(Kliŝo: „Le Matin")*

# R.B.L.E.

## Generala Jarkunsido

**Laŭ decido de la administrantaro de nia Ligo, kunveninta en Bruselo, la 2an de februaro, la Generala Jarkunsido okazos en la ejo de la Brusela Grupo „MIDI-BOURSE", rue de France, 35, Frankrijkstraat (apud la Suda Stacidomo), sabaton la 27an de aprilo, je la 15,30a horo.**

**La administrantoj kunvenos je la 14,30a h.**

---

ra aplaŭdo de la multaj amikoj de la jubileantoj.

### Speciala Honorigo de la „Moŝto"

Tiam ekleviĝis S-ro M. De Ketelaere, kiu post la laŭdaj vortoj, kiujn la prezidanto direktis al ĉiuj la cititaj festatoj ĝenerale kaj persone, volis ankaŭ honorigi la grandan jubileanton de la tago, S-ron Maurice Jaumotte, kiu, je la momento kiam li veteraniĝas post 40 jara esperantisteco, ankaŭ jubileas pro 30-jara prezidanteco.

S-ro M. De Ketelaere, en plej amikaj vortoj, memorigis la plej gravajn paŝojn en la esperanta vivo de S-ro Jaumotte, kies meritoj li prikantis, same kiel tion ankaŭ faros, post li, multaj aliaj amikoj, nome de la aliaj organizaĵoj en kiuj la festato efektive laboras kaj kiujn li plej ofte efektive prezidas.

Ni ne detale povas raporti pri ĉiuj tiuj ĉi gratulparoladoj, eĉ ne resumi ilin mallonge:

Esence ĉiuj atentigis pri la specialaj kvalitoj, kiuj permesas al S-ro Jaumotte plenumi la multajn taskojn, kiujn li akceptis en la esperanto-movado. Tiuj kvalitoj estas, antaŭ ĉio, ke li disponas pri eksterordinara laborkapablo, pri nekomparebla dinamismo, pri nesuperebla facileco adaptiĝi al la diversaj cirkonstancoj kaj tiel plenumi siajn rolojn en la seriozaj kaj gravaj okazoj, kiel en la plaĉaj kaj gajaj, en la amuzaj kiel en la tragikaj, helpata en tio per nediskutebla elokventeco natura.

Ĉiuj ankaŭ laŭdis lin, ĉar li plenumas siajn taskojn en daŭra bonhumoro kaj kun juneco de karaktero, kiun li sukcesis konservi ankaŭ ĝis nun, je l' momento de l' veteraniĝo kaj post tridek jaroj de prezidanteco.

Ni ne diros pli pri la enhavo de tiuj multaj kaj belstilaj laŭdigaj paroladoj kaj petas la legantojn kontentiĝi per la legado de la portreto de la „Moŝto", skribita de S-ro Sielens en la bela historia broŝuro pri la vivo de la Grupo, kaj kiu fakte resumas ĉion kion oni povas diri kaj efektive diris pri la jubileanto dum tiu dimanĉa tago.

Ni memorigu do nur, ke laŭvice



**S-ro H. Sielens, prezidanto de la O.K., prezentas la festantojn kaj la jubileanton al la Urbestro en la Milica Salono de la Urbdomo**

*(Kliŝo „De Nieuwe Gazet")*

parolis, post S-ro De Ketelaere, S-ino J. Plyson, kiu legis paroladeton de D-ro Kempeneers, prezidanto de B.C.K.E., malhelpata je la lasta momento ĉeesti la festojn pro malsaneto; S-ro J. Soyeur, vic-prezidanto de R.B.L.E.; S-ro G. Debrouwere, prezidanto de Flandra Ligo Esperantista; S-ro G. Van den Bossche, nome de „Belga Esperanto-Instituto"; S-ro R. Van Eynde, nome de E.K.I. (Antverpeno); S-ro R. Jacobs, prezidanto de la Brusela Grupo; S-ro Poupeye, prezidanto de la Bruĝa Grupo; F-ino Nachtergaele, nome de S-ino M. Vandervelde, ĉeestanta, kaj por la Genta Grupo; ree S-ro Soyeur, nome de la Lieĝa Grupo kaj S-ro A. Lodema, nome de sia nederlanda Grupo kaj de la eksterlandaj aliĝintoj.

Ĉiuj tiuj paroladoj, — inter kiuj kelkaj pro tempomanko devis esti prokrastataj ĝis la Festeno, — estis okazo por konkluda transdono de valorplenaj donacoj al la jubileanto kaj de riĉaj florgarboj al lia ĉarma edzino, la Unua Sinjorino de la Grupo. Tion prizorgis laŭvice S-ino Plyson, S-ro Verstraeten, F-ino Obozinski, S-ino R. Jacobs, F-ino R. Huysmans, F-inoj Yv. Poupeye kaj Is. Van Parijs, S-ino Gruslet kaj S-ro G. Van den Bossche.

### Respondo de S-ro Jaumotte

„N'en jetez plus, la cour est pleine" (Ne jetu plu, plena estas la korto) ekkomencis la festito! Li havas feliĉe bonan sanon, kaj tiel postvivos la laŭd-falegon, kiu superŝutis lin. Li kore dankas ĉiujn paroladintojn, kiuj, — ĉar ĉiuj estas bone konatoj, — estis ankaŭ ĉiuj certe sinceraj en siaj intencoj.

Kio nè signifas, ke li volas kredi ĉion, kion ili diris pri li. Ili ja certe troigis pro la simpla fakto ke ĉio, kion li faris kaj ankoraŭ faros, estas la sekvo de lia temperamento.

Lia temperamento estas tia ke li ja dèvas labori; ke li dèvas aŭdigi sian laŭtan voĉon; ke li ne povas kontentiĝi pri io kio similas al vivetanta vivo; sed ke li emegas kaj vere bezonas movoplenan bruan vivon.

Se la laboro efektivigita de li, — cetere kun la senĉesa kunhelpo de multaj aliaj —, estas efektive amasa en la daŭro de tiuj ĉi tridek jaroj, li tion ĉi efektivigis sen tro da streĉado, sen tro da laciĝo. Kaj estas la granda ĝojo de lia vivo, ke li fakte ĉiam en ĉiu tago, povis dediĉi proporcie grandan parton de sia tempo al siaj preferaĵoj, inter kiuj Esperanto tre certe kaptas lin plej forte; kaj ke li, — nun ankoraŭ, — povas daŭrigi tiun vivsistemon en bona sano kaj en plena matureca vigleco.

Li konkludis per kora dankvorto al ĉiuj en la salono, al ĉiuj ekster la salono, sed kiuj iel tamen partoprenis en la ĝojo de la grupo kaj de li mem kaj fine invitis ĉiujn al rapida kuniraĝo al la Urbdomo, kie atendas nin la Urbestro, kiun ni ne povas atendigi.

Tondra aplaŭdo aŭdiĝis kiam la prezidanto residiĝis post sia lasta promeso pri daŭrigo de sia laboro por Esperanto kaj por ĝiaj institucioj.



### Oficiala Akcepto en la Urbdomo

La oficiala akcepto en la Urbdomo estis antaŭvidita en la Milica Salonego, kie la urbestro mem, S-ro Craeybecx, aperis malantaŭ la tablo.

S-ro H. Sielens, kiel prezidanto de la O.K., unue prezentis la festantojn kaj la heroon de la tago al la Urbestra Moŝto.

Tiu ĉi tuj respondis ke li, pli bone, povus prezenti S-ron Jaumotte al ĉiuj ĉeestantoj, ĉar li konas lin plej longe ...de pli ol kvardek jaroj, kiam ili kune studis en sama klaso.

La Urbestro poste memorigis ke li ĉiam estis esperantema kaj ke li, — ankoraŭ antaŭ nelonge, dum vojaĝo en Israelo —, havis la okazon diri sian fidon en Esperanto, kiel ligilo inter la popoloj.

Li deziris al la Grupo, post tiuj 50 unuaj jaroj, ankoraŭ longan vivon kaj al la Prezidanto plej bonan sanon por la daŭrigo de liaj klopodoj por lia idealisma celo.

S-ro M. Jaumotte dankis, kiel prezidanto, en la nomo de la Grupo, kaj kiel speciala festato, por la personaj, amikaj vortoj de la Urbestro, kiu mem petis lin traduki laŭtvoĉe la urbestran paroladon en Esperanto.

Kaj, — unufoje pli, — nia bela lingvo aŭdiĝis, ne nur en la Milica Salono, sed tra la diversaj salonoj de la Urbdomo.

Tiam rondiris la glasoj da ĉampanvino, prezentitaj de la Urbestraro, okaze de nia Jubileo kaj S-ro Jaumotte vokis, por prezentiĝo al la Urbestro, la oficialulojn en la movado.

Kaj, post rapida vizito al la diversaj salonoj kaj post komuna fotografado, oni grupe direktis sin al la Festenejo.

### „Centkapa" Festeno

Je la unua kaj duono, ĉiuj denove kuniĝis en la luksaj salonoj de „Grüter", Mechelse steenweg, kie grandaj, larĝaj kaj per floroj ornamitaj tabloj plenigas la tutan mezparton.

Dum oni trinkis aperitivon, garbetoj estis transdonataj al la sinjorinoj kaj baldaŭ ĉiuj eksidis.

Ĉe la honortablo, kiun prezidis S-ro M. Jaumotte, ankaŭ kunsidis: G-roj H. Sielens, S-roj De Ketelaere kaj Verstraeten, G-roj R. Balleux, S-ino L. Bernaerts, F-ino De Winter, kungvidantoj de la Grupo, kaj krome S-ino Plyson, S-roj Soyeur kaj Van Gindertaelen, reprezentantoj de R.B.L.E. kaj G-roj Ch. Poupeye kaj R. Jacobs, reprezentantoj de la plej gravaj Grupoj, kiuj aliĝis al la Festoj.

La honorlokoj estis tamen plie daŭrigataj ĉe la tri longegaj tabloj, kie unuavice eksidis G-roj A. Faes, G-roj H. Vermuyten, G-roj H. Boffejon, S-ro M. Roost, G-roj Volders kaj S-ro Lodema.

La menuo, kiun la kunmanĝontoj jam ekkonis per la ĝenerala kaj cetere bele presita programo, anoncis:

*Supo Argenteuil*

———

*Soleaĵo Joinville*

———

*Rostita Kokino kun francmodaj pizetoj*

———

*Napola glaciaĵo*

———

*Kafo*

Aldonu ni, ke blanka kaj ruĝa vinoj estis prezentataj al ĉiuj dum la festeno kaj ke, inter la diversaj pladoj F-ino Maria De Cuyper, kantante plej variajn ariojn en Esperanto kaj en diversaj aliaj lingvoj, multe kunhelpis al la kreo de feliĉiga atmosfero. La aplaŭdo post ĉiu numero klare montris la kontentecon de ĉiuj pro tiu ĉi muzika ilustrado, kiun piane akompanis F-ino Cl. Peeters. Kaj kiam S-ro Jaumotte transdonis al la kantistino florgarbon, rea aplaŭdo rekompencis ŝin.

Oficialaj toastoj ne estis. Sed S-ro Jaumotte tamen nepre deziris refoje danki ĉiujn pro la bela manifestacio de simpatio, kiun ili kune organizis je lia honoro. S-ro H. Sielens ankoraŭ legis multajn gratul-telegramojn kaj leterojn; dum S-ro Lodema eldiris la nuran veran toaston, tiun al la sinjorinoj kaj tion faris sprite kaj gaje.

S-ro H. Vermuyten legis sian „*akrostikan Laŭdegon*", kiun ni ĉi sube represas, bedaŭrinde sen la desegnitaj strigoj:

*La strigoj simbolas la saĝon:*
*ili portu do sekvan omaĝon,*
*ja kvazaŭ en fablo modela,*
*al nia „festporko" verdstela.*

AKROSTIKA LAŬDEGO

J aumotte estas moto
A ntaŭ de l'verda roto
U nika ora libro:
M ot-or' do por motoro
O rgano kaj orgeno,
T raktor' per ĉiu fibro,
T orento kaj sonoro
E n beneluks-antverpeno.

Kaj la bonhumoro postdaŭris kiam S-ino G. Debacker aldonis amuzan interludon, legante „oficialan" proklamon pri kavalirigo de la „Moŝto" kaj tio iĝis okazo por transdono de donaco, floroj kaj de verda kol-rubando kun granda medalo. S-ro Jaumotte pro tiu „honorigo" kore dankis.

Tiel la atmosfero iom post iom altiĝis kaj baldaŭ ĉiuj kune kantis kaj la Prezidanto, en tiu ĉi okazo, unufoje pli, montris ke li estas nelacigebla.

Kaj ĉiuj miregis, kiam li anoncis ke baldaŭ estos tempo por ekleviĝi, se oni volas esti akurate en „Witte Leeuw", kie la festoj konkludiĝos per lasta festvespero.

## Fondaĵo „Antoinette Jennen"

### Rezultato de la intergrupa konkurso

Jam de diversaj jaroj okazas intergrupa konkurso, per kiu la gajninta grupo akiras premion el la „Fondaĵo Antoinette Jennen", kiu estas transdonata solene al la prezidanto dum la ĉiujara Kongreso.

Diru ni tuj ke la premio, kiun ricevis la Antverpena Grupo „La Verda Stelo", dum la lasta Kongreso, estas gajnita en 1956 de la *Bruĝa Grupo Esperantista*, kiu altigis sian membronombron per pli ol 40 % kaj sian kvocienton en la konkurso per 35,2 %!

Ĉi sube ni donas la komparajn procentojn por la jaroj 1955 kaj 1956:

| Grupo | 1955 | 1956 | Akirita % |
|---|---|---|---|
| Antverpeno | 742 | 744 | 100,3 |
| *Bruĝo* | *309* | *418* | *135,2* |
| Bruselo | 394 | 347 | 88,1 |
| Charleroi | 41 | 24 | 58,5 |
| Gento | 98 | 87 | 88,8 |
| Lieĝo | — | 60 | — |
| Verviers | 104 | 92 | 88,4 |
| Izoluloj | 57 | 40 | 70,2 |

Aldonu ni, ke R.B.L.E. mem altigis sian membronombron dum la jaro 1956 per pli ol 8 % kaj tio estas kuraĝiga rezultato, por kiu estu gratulataj ĉiuj grupoj, sed tutspeciale la Grupo de Bruĝo, kiu plej forte kontribuis al tiu ĉi plialtigo.

---

### La fina Festvespero

Se kelkaj eble iom timis ĉu multaj ankoraŭ kuniros al „Witte Leeuw", ili tre certe povis miri, ĉar ĉiuj senescepte rekuniĝis tie; dum kelkaj pliaj samideanoj, kiuj estis malhelpataj ĉeesti la festenon, ankoraŭ venis kaj pligrandigis la nombron de partoprenantoj.

Post deklamado de originala poeziaĵo de S-ino van den Neste, kiun la prezidanto kore gratulis, la skeĉo de Raymond Schwarz „*En la kaverno „La Murdistoj*" tuj kreis gajan atmosferon, speciale pro la vere mirinda maniero, laŭ kiu la aktoroj kaj aktorinoj de „La Verda Stelo" sukcesis sugesti la atmosferon.

F-inoj J. kaj M. Ameryckx, L. De Winter kaj Cl. Peeters kaj S-roj Fr. Schellekens, W. Van Nereaux, A. Verhoeven kaj J. Vinck vere amuzis la ĉeestantaron dum la tuta daŭro de la skeĉo. Kaj la transdono de floroj al

# BELGA KRONIKO

**Prezidanto:** S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44, Wilrijk.
**Vicprezidanto-Kasisto:** S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.
**Vicprezidantino:** S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.
**Ĝenerala Sekretario:** S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo", Falconrui, 21, Antverpeno.
*(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)*

ANTVERPENO

## Esperanto-Grupo „La Verda Stelo"

*(Poŝtĉeknumero: 726.54)*

El nia raporto pri la Kristnaska Atmosfero forfalis linio, en kiu ni diris ke S-ino van den Neste ankaŭ kunlaboris per prelego de interesa artikolo pri la sciencisto M. Faraday, kiun atente ĉiuj aŭskultis.

La 4an de januaro okazis parolata ĵurnalo al kiu, krom multaj grupanoj, ankaŭ partoprenis S-ro A. Lodema, malnova nederlanda amiko, kiu pritraktis la suplementon de Plena Vortaro.

La 11an sekvis debato, enkondukata per tre zorge kunmetita kaj tre interesa parolado de S-ro Luc. De Marré pri la temo „Kongolando, al kiu"? sed en kiu tiu ĉi nova kaj juna esperantisto plej kompetente priparolis la kolonian politikon de aliaj grandregnoj kaj tiun sekvitan kaj sekvotan de ni mem. Bonega vespero kun tre vigla debato.

La 18an la kunvenintoj dividiĝis sur la du etaĝoj: en la unua okazis ripetadoj kaj finaranĝoj por la festoj: en la dua jam ekkomenciĝis la festoj per kunkantado kaj... kunmanĝado de dolĉajoj.

Pri la festoj de la 19a kaj 20a, detala raporto aperas aliloke en tiu ĉi numero kaj la 26an, post dankvorto de S-ro Jaumotte al ĉiuj kunlaborintoj al la festoj, S-ino G. Debacker faris tre ŝatatan paroladon kun filmo kaj lumbildoj pri Portugalujo. Kunlaboris en tiu ĉi vespero S-ro Montmirail, kiu permesis la taŭgan uzadon de sonrubando kaj S-ro Van Eynde, kiu prezentis la filmon. Al la paroladistino kaj al ŝiaj kunhelpantoj la prezidanto direktis korajn gratulojn.

Kaj la 2an de februaro okazis la ĝenerala jarkunsido, kiu, pro la jam okazinta honorigo de la jubileantoj, konsistis nur el kompleta raporto de la sekretario S-ro J. Verstraeten pri la laboro en 1956, de la kasisto S-ro R. Balleux pri la kaso, de F-ino L. De Winter pri la financaj sekvoj, cetere bonegaj, de la festaj kaj amuzaj aranĝoj kaj el danka kaj kuraĝiga paroladeto de la prezidanto, kiu alvokis al nova, plia laboro.

**Programo de la venontaj kunsidoj:**

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw", Frankrijklei 4, je la 30,30a h. (1-a etaĝo).

**Februaro:** Krom E.K.I.-vespero kun parolado de novzelandano S-ro B. Potts, ĵaŭdon la 7an kaj vizito al la Pulĉinela Kelo, la 8an, estas antaŭvidataj: la 15an: Diplomdisdono al la lernintoj de la elementaj kurso kun parolado kun lumbildoj de S-ro R. Van Eynde pri „Impresoj pri Svedujo" kaj la 22an: Debatvespero: „Ĉu virinoj soldatiĝu?"

**Marto:** la 1an: Parolata ĵurnalo; Sabaton la 2an: Karnavala Balo; la 8an: Parolado de S-ro Luc. De Marré pri „Astrologio" (kun lumbildoj); la 15an: Filmvespero: la 22an: Radiofona teatraĵo; Dimanĉon, la 24an: komuna vizito al la nova Folklora Muzeo, Gildekamerstraat: la 29a: Kabareta Vespero.

Gratuloj.

Korajn gratulojn al S-ro Roger Jaumotte kaj S-ino Félicie Jaumotte-Meulemans, kiuj ambaŭ akiris la Arĝentan Medalon de la Ruĝa Kruco, pro servoj faritaj dum pli ol 10 jaroj ekde la liberiĝo en 1944, kiam ili ekfunkciis en flegejo de la R.Kr.

BRUĜO

## Bruĝa Grupo Esperantista

*(Poŝtĉeknumero: 4835.33)*

Unua kunveno de la jaro okazis la 8an de januaro: post korektado de lastaj taskoj de la finiĝinta kurso, la ĉeestantoj portretludis. Parolata gazeto aperis la 15-an de januaro kun kontribuoj de S-ino Poupeye: „Humoraĵoj", S-ro Fernand Rosseel: „Historietoj" kaj S-ro Ch. Poupeye: „Mi petas la manon de via filino". Dimanĉon, 20an de januaro, sesopa delegitaro ĉeestis en Antverpeno la jubileajn festojn de „La Verda Stelo". La ĝenerala jarkunveno okazis la 22an de januaro kun la kutimaj raportoj. La komitato estis reelektata entute kun aldono de S-ro Raoul Behaeghel, la nuna kursgvidanto de St-Michiels, kiel oka komitatano. Programo pri estonta agado kaj petoj kaj proponoj de la membroj estis ekzamenataj. Dum la kunveno de la 29a de januaro aranĝoj estis prenataj por vizito de samideano S-ro B. Potts (2/2) kaj por la dua

---

la ulinoj kaj la laŭdoj al ĉiuj estis plia okazo por rea aplaŭdo.

Aplaŭdo kiu ankoraŭ kreskis post la kantoj de S-ro P. Peelman kiu, en moderna repertuaro de konataj arioj, akiris tre grandan sukceson. Ĉiuj en la salono ja fine kunkantis la rekantaĵojn.

Por fini S-ro M. Jaumotte prezentis amuzajn ludojn, kiujn la verdstelanoj jam havis la okazon ekkoni, kaj kiuj refoje ĝuis ĝeneralan sukceson.

Kaj la naŭa horo alproksimiĝis; sed la atmosfero estis tiel bona ke ŝajnis malfacile tuj disiĝi kaj la estraro decidis, ankoraŭ dum plia horo, daŭrigi la festojn per komuna dancado.

S-ro Montmirail tuj zorgis por dancmuziko kaj, ĝis la deka, multaj ankoraŭ kune restadis, dancante kaj babilante.

Estis gaja konkludo de du belaj tagoj, pri kiuj ne nur la Verdstelanoj mem, sed ankaŭ ĉiuj ĉeestintoj eksterurbaj, ankoraŭ longe memoros.

Kaj tial, tiu ĉi raporto nepre devas finiĝi per la cito de la membroj de la Organiza Komitato, kiuj, kun la senlacaj prezidanto S-ro Sielens kaj sekretario S-ro Verstraeten, bone aranĝis ĉion kaj zorgis ke la festoj de la Ora Jubileo de la plej grava belga grupo, estu ne nur decaj, sed ankaŭ amikaj, gajaj kaj amuzaj. Ni citu, en unua vico, la kasiston S-ron Balleux kaj, kun li: S-inon L. Bernaerts, F-inon L. De Winter, F-inon Hel. Hofkens, F-inon Elsa Van der Weken kaj S-rojn J. Montmirail kaj G. Van den Bossche, gemembrojn.

Ili ĉiuj meritas ĉies dankemon kaj ni do plenkore ĝin konfirmas tie ĉi!

L. R.

***

*Aldonu ni ke, dank' al la vigla kunlaboro de la gazetara sekretario S-ro Roger Jaumotte, kiu abunde dokumentis siajn kolegojn-ĵurnalistojn, ĉiuj antverpenaj tagĵurnaloj aperigis longajn, favorajn raportojn pri tiuj ĉi festoj, kaj ke eĉ diversaj aliurbaj ĵurnaloj ilin ankaŭ pli mallonge komentariis.*

**Grava Informo**

**Ni atentigas ke tiu ĉi numero estas la lasta, kiu estos sendata al la abonintoj por 1956a, kiuj ne jam estos repagintaj sian kotizon je la forsendo de la numero de marto.**

G. FAES
16, Schoenmarkt, 16
ANTVERPENO
Por via MUZIKO
RADIO kaj GRAMOFONO



# 5-a Beneluksa Esperanto-Kongreso

*Vic-prezidanto por Fl.L.E.: Fl.L.E. nomas kiel sian vic-prezidanton por la estonta kongreso: F-inon J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.*




**BELGAJ ALIĜONTOJ.**

La kongresontoj de Flandra Ligo Esperantista kaj de Reĝa Belga Ligo Esperantista bonvolu pagi respektive al: Vlaamse Esperantistenbond, p.ĉ.k. 2321.50, Raapstraat 74, Gent;
Belga Kongreso de Esperanto, p.ĉ.k. 376698, rue Jourdan 185, Bruselo.

La guldenon bonvolu kalkuli je 14 frankoj.

**KLARIGA ALDONO DE LA KONGRESA ALIĜILO,**

fidante, ke ni kontentigas la petintojn kaj petontojn, la L.K.K. volonte donas jenajn detalojn pri la ekskurso „Oisterwijk".

**La vojo**

Ni veturos tra la urbocentro de Eindhoven laŭlonge de la fabrikkompleksoj de Philips; tra tipe brabantaj lokoj en ĉirkaŭaĵo de abundo da sovaĝa naturbelo; al Oisterwijk.

**Vidindaĵoj**

Ĉi tiu veturo prezentos al ni interesajn vidindaĵojn, i.a. monumenton kaj laborejon de Vincent v. Gogh, akvomuelejojn el la 9a kaj 11a jarcento, antikvaĵojn el la mezepoko, k.t.p.

**Brabanta panmanĝo**

En Oisterwijk nin atendos tipe brabanta panmanĝo konsistanta el: 4 specoj de viando, 5 specoj de pano, ovo, fromaĝo, kuko, marmelado, k.t.p. Ĉio estos abunde servata de brabante vestitaj servistinoj en belega ĉirkaŭaĵo.

**Promenado**

Post ĉi tiu agrabla zorgo por nia stomako sekvas unika promenado kaj vizito al:

**Rommeldam**

Ĉi tiu estas interesa fabelurbeto, kiu estas ĉarma imitaĵo laŭ la bildrakontoj pri Tom Poes, Ollie B. Bommel, k.t.p.

**La prezo**

En la prezo ned. guld. 8.25 p.p. ĉio estas enkalkulita. Ne estos kromkostoj. Personoj kiuj ŝatas kuniri kun la ekskurso per propra veturilo povas tamen partopreni la brabantan panmanĝon. Ili pagas por tio ngd. 3,35.

**ATENTU**

Pro la necesa frua mendo de diversaj aferoj, ne nur rilate la ekskurson sed ankaŭ loĝadon, manĝojn k.t.p. kaj por antaŭforigi seniluziiĝon, baldaŭa anonco necesas.

Anonco sen pago ne validas.

**Ŝanĝo en la provizora programo**

Anstataŭ la dimanĉa *pan*manĝo je horo 12.30 la L.K.K. aranĝos varman *tag*manĝo je la sama tempo. Ne estos komuna panmanĝo je dimanĉo.

**Helpo al Hungaraj Samideanoj**

Ni ricevis leteron de tre bone konataj samideanoj kiel Dr. Kalocsay kaj Pal Balkanyi en kiu niaj tiaj amikoj sciigas ke ili fondis helpkomitaton por sortotrafitaj Esperantistoj. Ili demandas ĉian ajn helpon, sendadon de pakaĵoj kun nutraĵoj, vestaĵoj ktp. Ili diras ke estas kun ĝeno ke ili demandas tion, sed la urĝa neceseco diktas ĝin. Ni bone komprenas kaj varme rekomendas. Jen adresoj; Pal Balkanyi Budapest II Pesthidegkut, Haraszt u. 33 kaj D-ro K. Kalocsay Budapest VIII Maria utca 34 Hungarujo.

**Kondolencoj.**

Al S-ino Julienne CAERELS kaj al F-ino Marguerite BARTHOLOME, membrinoj de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia fratino kaj onklino: S-ino Idesbald de MADRID, naskita Laura Caerels (28/1/57).

BRUSELO

## Esperantista Brusela Grupo

*(Poŝtĉeknumero: 12.50.48)*

La jara agado komenciĝis la 7an per parolata ĵurnalo, laŭ nova sistemo tre bona sukcesinta kaj per kiu akiris premiojn: por verkita artikolo: S-ro Schumacher kun „Bildoj kaj fotografado"; por elektita kaj legita teksto: S-ro R. Jacobs kun „Humoraĵo el libro de l'Humoraĵoj", dum la diskutinda teksto estis tiu de F-ino S. Obozinski: „Kio estas Karaktero".

La 13an S-ino Ernst tre interese paroladis pri „Peer Gynt" de Grieg, tradukita en Esperanto, kaj dum kiu ŝi aŭdigis tre belan longturniĝantan diskon de muziko de Grieg. Ŝi akiris meritltan sukceson.

La 21an S-ro Vander Stempel klere pritraktis diversajn subtilaĵojn de nia lingvo: ne jam kaj jam ne: pli da kaj plu kaj la transitivajn kaj netransitivajn verbojn: dum li ankaŭ ĉiujn paroligis.

La 28an sekvis la ĝenerala jarkunsido, dum kiu nova teksto de interna regularo estis aprobata kaj elektata la nova Komitato, kiu nun konsistas el: S-ro R. Jacobs, prezidanto; S-ino Marg. Weyn, vicprezidantino; S-ro M. Jirousek, sekretario: S-ro D. vander Stempel, helpsekretario: S-ro H. Schumacher, kasisto; S-ino Mad. Stern, helpkasistino kaj S-ino Elly Staes, komita-

---

balo de la nuna sezono (16/2).

Komitata kunveno de la 30a de januaro dividis la komitatajn postenojn jene: Prezidanto: S-ro Ch. Poupeye; Gevicprezidantoj: F-ino A. Boereboom, S-ro D. Demeulenaere kaj S-ino S. Verbeke-Vanden Berghe; Sekretariino: F-ino Yolande Van Parys; Kasistino: F-ino Isabelle Van Parys; Helpa sekretario-bibliotekisto: S.ro Raoul Behaeghel; Konsilanto: S-ro Robert Lagast.

**Programo de la venontaj kunvenoj:**

1e: ĉiulunde, je la 8a vespere, en la komunuma lernejo de Sint-Michiels: daŭrigo de la elementa kurso sub gvidado de S-ro Raoul Behaeghel:

2e: ĉiumarde: je la 8-a vespere, ek de la 5-a de marto, **en la provizora kunvenejo „CONCORDIA" Zuidzandstraat 5,** (tel. 366.24):

Dum la unua horo de ĉiu kunveno: lecionoj de nova ELEMENTA KURSO, sub gvidado de la prezidanto. Ĉiu membro konsideru kiel devon varbi kaj alkondruki almenaŭ unu novan lernanton!

**Programo por la dua horo:**

**Marto:** 5-an: Interkonatiĝo inter novaj gelernantoj kaj malnovaj gemembroj. — Disdonado de diplomoj al gelernintoj de antaŭa kurso; 12-an: Portretludado; 19-an: Legado de B.E.; 26-an: Parolata gazeto.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°
LA LOUVIERE S.P.R.L. Tel. n-roj 223.01 - 225.37
*Du esperantaj markoj:*
**TABULO**, por lernejtabuloj; **KATOKULO**, por signalvitroj.

# BIBLIOGRAFIO

*TEATRO EN SOCIETO. Rememore al la 10a datreveno de la fondiĝo de Esperanto societo „Bude Borjan" en Zagreb, Jugoslavio.*

*Eldonis Kroata Esperanto-servo Zagreb, Amruŝeva, 5/1 Formato 11 x 16 cm., kartonita, 84 paĝoj, prezo ne indikita.*

*KUNMETITA de S-ino E. Lapenna kaj S-ro Shertse Mulo.*

Por la plenigo de diversaj festvesperoj en la Esperanto grupoj tiaj libretoj kutime tre valoras. Bedaŭrinde la eldonejoj nur malofte publikigas tiajn verkojn.

Unuavide, la menciita eldono plene kontentigas, ĉar ĝi enhavas 12 simplajn teatraĵetojn: du por seriozaj kunvenoj, 10 diversspecaj, plejparte kun komikaj tekstoj. Tamen la tralegado iom seniluziigas. La intrigoj montriĝas tro simplaj, ofte eĉ banalaj.

Krome, la preseraroj abundas: sur malgranda paĝo, troviĝas 5 preseraroj! Ofte ili eĉ ŝanĝas la signifon de la frazoj.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel. : 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

tanino.

La Komitato estis komisiata pristudi la organizon de festoj okaze de la Ora Jubileo de la Grupo, kiu estis starigata la 10an de februaro 1907a.

**Programo de la venontaj kunvenoj:**

ĉiulunde, je la 20a h., en „MIDI-BOURSE", (1-a etaĝo), 35, rue de France (Suda Stacidomo) Tel. 22.46.29.

**Februaro: (memorige):** la 18an: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 25an: Mitulvespero en Karnavala Atmosfero, ĉe „Le Roi des Moules", 1, rue de Laeken, je la 19,30a h. (organizantoj: S-ino Castel kaj S-ro Swinne).

**Marto:** La 4an: parolata jurnalo; la 11an: Parolado de S-ino Daems: „Ĉu oni povis antaŭvidi la okazintaĵojn de Hungarujo?"; la 18an: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel: la 25an: Antaŭlegado de S-ro R. Jacobs el „La Historio de „La Verda Stelo", verkita de S-ro Sielens.

## LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

### Antverpeno

**G. Faes**, Schoenmarkt 16. Antverpeno. Muziko, Radio, Diskoj.
**„In 't Duifken" (S-ano Paesmans)**, Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)
**Vino Max Bolsius**, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85
**M. Philips**, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.
**P. van der Hoydonck-van den Buys**, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg. Ŝuoj — Teksaĵoj — Mercerajoj. Tel. 74.27.86
**J. Montmirail**, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66
**Morris de Ketelaere**, Oostenstraat 25, Antverpeno. Ĥemiaĵoj. Tel. 39.17.09
**S-ino Henny Jacques-de Keteleare**, Beeldekensstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38
**Roger Jaumotte**, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14
**K. Amerijckx**, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07
**R. De Soete-Vanistendael**, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0
**CL. Peeters**, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67
**Firmo van Iseghem & Verstraeten**, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken. Vitrajoj — Speguloj — Tel. 37.88.20
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81
**H. Peeters**, Vordensteistr. 58, Schoten. Inĝen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47
**H. Jacques**, Lange Beeldekensstraat 31, Antverpeno. Presajoj. Tel. 33.75.38
**Verdijck**, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07
**P. Peelman**, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumajoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55
**Y. Ameryckx**, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltajoj
**M. Blajwas**, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18
**A. van den Neste**, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59
**J. Van Hoof**, Marialei 7, Antw. - Pentraj-entreprenoj Tel. 39.35.33

### Bruĝo

**Marcel Poupeye**, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93
**Charcuterie Strovi**, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08
**Maison Joye**, Gelmuntstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75
**Firmo G. Verbeke**, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85
**Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL**, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

### Bruselo

| | |
|---|---|
| **M. Jirousek**, 104 rue du Téléphone; reklamoj kaj litertipoj | 18.77.67 |
| **Farmaciisto Jacobs**, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 | 15.26.01 |
| **Farmaciisto N. Nelis**, Meise | 59.13.73 |
| **„BONBONS SWINNE"**, 77, rue de Nieuwenhove | 44.57.36 |
| **Imprimerie Lielens**, 18, rue de la Princesse | 21.10.98 |
| **CARRELAGES „Carrart"**, 19, avenue de Saxe | 21.74.49 |
| **Viajn MEBLOJN** ĉe **S-ro Weyn**, aĉetu rue Destouvelles, 57 | 15.96.97 |
| **Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj, F-ino Kestens** 24, rue Bodenbroeck | 11.71.03 |
| **Tinkturejo, senmakuligejo „TEX"** 11, Av. du Couronnement, Woluwe St. Lambert | 70.75.82 |

**KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj**

**G. Baeten**, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj
**„De Boerinekens"** (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo
**A. Roels**, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07
**G. Goemaere**, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo
**Vandersmissen**, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperajoj, parfumaĵoj
**Librejo Schuttershof**, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj
**Vojaĝ-agentejo Pier Busseti**, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

## KORESPOND-ANONCOJ

Stefan Bieganski Mikstat ul. Ogrodowa 202 woj.pozn. Polujo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

* * *

Ernest Permanne Rue St. Etienne 9 Fécamp (Seine Maritime) Francujo.

Prezidanto de la loka Esperanto-grupo deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

* * *

Jun-Ichi-Osumi 3-3 Chitosecho Sumidaku TOKYO Japanujo deziras korespondi per leteroj kaj bildkartoj.

Armando M. Araŭjo Rua dos Ferreiros a Estrella Nr. 19-R CH. Edo LISBOA Portugalujo, deziras interŝanĝi ĉenleterojn.

* * *

Walter Murray 3735-16 th Avenue South, St. Petersburg 7, Florida United States America, komencanto kiu deziras korespondi.

* * *

Serĉas korespondanton S.ino Dora Jonĉeva, rue 9 Dimitrov 10, Kozanlik Bulgarujo.